
# Vi havas belan akĉenton, el kiu lando vi venas?

***Tasko : aldonu la akuzativon kie tio necesas***




Al ĉiuj_____ okazis tio_______, ke oni iam aŭdis homo_____ parolanta_______, kaj tuj eksciis el kiu______ mondo-parto _____ tiu venas. Akĉentoj_____ ofte malkaŝas la deveno______ de la parolanto______ sed, kio______ okazas se tiu_____ akĉento_____ estas nefidinda? Ekzistas rara sindromo kiu, kutime post serioza_____ cerba_____ lezo______, povas ŝanĝi la akĉento______ de homo_____ tiel, ke tiu eksonas kiel fremdulo______ en sia_____ propra_____ lingvo______ aŭ dialekto______. Tiel do itala virino povas ekparoli kvazaŭ ŝi estus usonano, kiu lernis la itala_____, kaj la plej miriga afero estas tio, ke oni ne scias kial tio estas.

La pacientoj______, kiuj_____ suferas tiu____ ĉi sindromo______, neniam estis en la loko al kiu______ rilatas la akĉento______, kiu_____ ili subite akiris. Ili do konfuzite ekserĉas respondoj______ ĉe kuracistoj_____, kiuj ne ĉiam havas kontentiga______ klarigo______.

Esploristoj el la Universitato de Oksfordo rilatigis tiuj______ nekutimaj______ sonoj______, kiuj______ kunformas la nova_____ akĉento______, al la cerba____ lezo______, kiu ofte akompanas la sindromo_____. Laŭ tiu _____teorio_____, damaĝo en la cerbo-partoj kiuj kontrolas la lingvo-funkcio______, povus estigi misprononcitaj______ silaboj______ aŭ ŝanĝitaj______tonoj_____.

Tamen, laŭ aliaj_____ sciencistoj______, la lingvo-centroj de la cerbo entute ne havas

rolo______ en ĉi tiu sindromo, sed ĝi okazas pro tio______, ke la paciento perdis la mova______ lerteco______ por produkti kelkaj______ sonoj______laŭ la kutima artikulacio. Se unu el la sonoj, kiuj_______ ili ne plu povas elparoli, estas karakterizaj de iu_____akĉento______, la homo tiam povus nekonscie preni pliaj______ trajtoj_______ de ĝi por doni naturecon kaj fluecon al la parolado.

Ekde 1941 estis sesdeko______ da registritaj_____ kazoj______ de la tiel nomata sindromo de la fremda akĉento, el kiuj kelkaj signifis eĉ problemoj______ por la paciento______. Akĉento estas parto de la homa identeco kaj tiel ĝi ankaŭ donas sento______ de aparteneco______ al specifa______ grupo______. Se tiu homgrupo estas siavice malbone akceptata en alia socio, tiam estiĝas problemoj_____.

Tiel okazis ekzemple al Astrid L., virino el Norvegio, kiu estis trafita de ŝrapnela_____ eksplodo______. Teorie resaniĝinte, ŝi konstatis, ke ŝi havas germana_____ akĉento____, kio provokis ĝenerala_______ malakcepto_______inter ŝiaj samlandanoj.

Kelkaj pacientoj sukcesis rehavigi al si_____ sia_____ originala______ akĉento______, kaj tio estus eksplikebla laŭ la teorio_______, ke la kaŭzo estas cerba lezo: la cerbo povas ripari la damaĝitaj______ partoj________ per aldona sango-fluo al la koncernaj______ neŭronaj_______ regionoj______.

Tamen, rilate kuracado_______, estas ĝis nun tre malmultaj______ sukcesoj_______ science kontrolitaj_______.

*(Fonto: Kontakto 2009:2)*

*Kompleta teksto*

## Vi havas belan akĉenton, el kiu lando vi venas?

Al ĉiuj okazis tio, ke oni iam aŭdis homon parolantan, kaj tuj eksciis el kiu mondo-parto tiu venas. Akĉentoj ofte malkaŝas la devenon de la parolanto sed, kio okazas se tiu akĉento estas nefidinda?Ekzistas rara sindromo kiu, kutime post serioza cerba lezo, povas ŝanĝi la akĉenton de homo tiel, ke tiu eksonas kiel fremdulo en sia propra lingvo aŭ dialekto. Tiel do itala virino povas ekparoli kvazaŭ ŝi estus usonano, kiu lernis la italan, kaj la plej miriga afero estas tio, ke oni ne scias kial tio estas. La pacientoj, kiuj suferas tiun ĉi sindromon, neniam estis en la loko al kiu rilatas la akĉento, kiun ili subite akiris. Ili do konfuzite ekserĉas respondojn ĉe kuracistoj, kiuj ne ĉiam havas kontentigan klarigon.

Esploristoj el la Universitato de Oksfordo rilatigis tiujn nekutimajn sonojn, kiuj kunformas la novan akĉenton, al la cerba lezo, kiu ofte akompanas la sindromon. Laŭ tiu teorio, damaĝo en la cerbo-partoj kiuj kontrolas la lingvo-funkcion, povus estigi misprononcitajn silabojn aŭ ŝanĝitajn tonojn. Tamen, laŭ aliaj sciencistoj, la lingvo-centroj de la cerbo entute ne havas rolon en ĉi tiu sindromo, sed ĝi okazas pro tio, ke la paciento perdis la movan lertecon por produkti kelkajn sonojn laŭ la kutima artikulacio. Se unu el la sonoj, kiujn ili ne plu povas elparoli, estas karakterizaj de iu akĉento, la homo tiam povus nekonscie preni pliajn trajtojn de ĝi por doni naturecon kaj fluecon al la parolado.

Ekde 1941 estis sesdeko da registritaj kazoj de la tiel nomata sindromo de la fremda akĉento, el kiuj kelkaj signifis eĉ problemojn por la paciento. Akĉento estas parto de la homa identeco kaj tiel ĝi ankaŭ donas senton de aparteneco al specifa grupo. Se tiu homgrupo estas siavice malbone akceptata en alia socio, tiam estiĝas problemoj. Tiel okazis ekzemple al Astrid L., virino el Norvegio, kiu estis trafita de ŝrapnela eksplodo. Teorie resaniĝinte, ŝi konstatis, ke ŝi havas germanan akĉenton, kio provokis ĝeneralan malakcepton inter ŝiaj samlandanoj.

Kelkaj pacientoj sukcesis rehavigi al si sian originalan akĉenton, kaj tio estus eksplikebla laŭ la teorio, ke la kaŭzo estas cerba lezo: la cerbo povas ripari la damaĝitajn partojn per aldona sango-fluo al la koncernaj neŭronaj regionoj. Tamen, rilate kuracadon, estas ĝis nun tre malmultaj sukcesoj science kontrolitaj.

*(Fonto: Kontakto 2009:2)*